





JARO 8 - JANUARO - 1996 - Nº 15
ASTURIO

ENHAVO

- 2 Nia Urbo
- 3 Sendaĵo
- 4 Insuloj
- 5 Petro kaj Maria Kurie
- 6 Al iu-ajn
- 7 El Trasgu
- 8 Zamenhoftago
- 9 Mezaĝoj
- 10-11 Telesita
- 12 Kuriozaĵoj
- 13 La Viroj de la Lakta
Vojo
- 14 Guto
- 15 Amuzaĵoj
- 16 Feliĉan Novjaron



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**



NIA URBO

Estraro de ANTAŬEN

* * *

Prezidanto: Nicolás Muñiz
Sekretariino: María Luisa
Menéndez

Kasisto : Celestino Fernández
Bibliotekisto: César García
Desegnisto: Císimo
Rabanedo

Gekomitatanoj:
Ma. José Alvarez Faedo
Olga Peña
David Menéndez
Eva González

* * *

Nia adreso:

Casa Municipal de Cultura
33400 Avilés (Asturias)
Tfno.- 98-554 11 27

Subvenciita per la Registaro
de la Avilesa Municipo

Depósito legal:
n° As 1.398\91

Kun la viandoj oni preparas pladojn tiel diversaj kiel bongustaj: kuirita viando kun pizoj, la farĉadoj rulaĵoj kaj la plej delikata "roast-beef", specialaĵo de hotelo, kiu tute ne envas al la plej bongusta servita en la Britaj Insuloj.

Inter la desertoj elstaras la prujna buterkuko, de antikva recepto, la neimitebla migdalfromaĝo; la kristnaska artefarita nugato el multaj konfitaĵoj; la rizo kun lakto kun rostegita sukero; la kazeo - premita lakto- nura aŭ kun fragoj.

Duonartefarita fromaĝo, kiu jam superis jarcenton da vivado, kunportas sur sia etiketo la nomon Avilés.: ĝi estas la fromaĝo de "La Peral", ellaborita en la ejo de la men nomo de la najbara municipo "Illas" per fromaĝmajstroj.

Kaj la fruktoj: cerizoj "llaviana", pomoj "raineta", piroj "de la Dukino", "klaudiaj" prunoj, setembraĵoj figoj, fragoj de "Candamo", kastanoj kaj juglandoj de la apudaj vilagetoj.

La Redakcio (Daurigos)

SENDAJO



Sinjoro : unu vorto de optimismo
metas haloon de lumo sur la frunton,
kaj de l' fundo senfina el ĝia abismo
reaperas nova mondo pli potenca

La vorto estas miraklo, do pro ĝi
oni rigardas al la kulmino aŭ al la tero
Sinjoro: via vorto estis stelo,
la pupiloj, ankoraŭ rigardas al la ĉielo.

I N S U L O J

Trairante la maron de la imageco oni povas observi -
ne sen mirego- nenombreblajn insuloj el karno kaj
konfuzo, kiuj suferas heroe, la albatojn de la akvo en
siaj malfortaj flankoj kaj la putrajn malpuraĵojn kiujn
ĉiu tajdo deponas sur siaj, antikve, blankaj sablejoj.

Ili nur esperas -kvankam la tempo neniam estis sia
aliancano- la astrologan konjunkcion, la neeban istmon,
kiu alproksimigos ĝin, kiel ununura hejmo, ondorompilo
komunuma, kontinenta alianco konvertiĝas en kruta
kontraŭ la tempesta kaj superrega universala barbareco.

Ili destinas, dum la espero, iluziajn horojn al la
semado de novaj songoj sur la dezerta pejzaĝo el sia
rokplena deveno -senfrukta pro la gvatado de la
realeco- kaj siaj semoj atendas ke la deziregata pluvo
ĝermos la avidajn internaĵojn kaj floros kiel viva
realeco, florojn en unua songo, kiujn la Vivo postulas
por si men, por plenumi sian propran destinton de
nekonata, mirinda kaj funebra ĉeesto.

PETRO KAJ MARIA KURIE



En aŭtuno de 1891 alvenis al Parizo, devenanta de Varsovio, pola junulino je dudek kvar jaroj, Maria Skłodowska. La junulino, ega amatorino de la sciencaj studadoj, registriĝis en la Scienca Fakultato de la universitato La Sorbono. Ŝi estis tre malriĉa, ŝi loĝis en subtegmento, kaj por povi studi ŝi purigis la flakonojn kaj zorgis la fornojn en la laboratorioj kiel ankaŭ estis farinta la granda Faradaj. En la sama laboratorio kie ŝi, laboris la juna Petro Kurie, franca talenta traserĉisto, kiu sin dediĉis kun sia frato, al la fizika elektraj traŝercoj. Je 1894 en hejmo el komunaj amikoj, Maria konis Petron, posts dek ok monatoj ili edziĝis. Tiel oni konstituis edziniĝon, kiu iĝis famkonata en la scienca historio, ĉar kune, ili atingis la grandan malkovron de la radiumo.



Bela kaj fragila flor'
kies parfum' ekstazigas
kaj kies kolor' mirigas:
kiam infanec' jus pasas
jam blindumas via splendor'!

Ĉu vi permesas min kanti
vian unikan belecon
kiam vi est', amatino,
la plej luma brilantastro
el la ĉiel' imperio?

Dio la pregon inspiras
la patrino inspiras amon
la sanktoj kulton inspiras
inspiras ĝojon la infano
kaj vi inspir' mian kanzon'.

Kanzon' kiu sprucis pace
sub varmo de via ekbril'
rigardant' viajn okul'
indaj esti la plej belaj.
Jes, sultanin', kvazaŭ aŭdi
aman kant' ofend' al vi,
mi nenian lasos voj'
voj' kiun strekis trezor'
de la plej bel' kor' sur ter'.

Mi volas havi la ĝojon
kaj kanti al via beleco;
mi volas vid' se, sur ter',
estas anĝel' por ĉiel'
kaj virgulin' kast' kaj pur'.

Mi volas senti plezuron
de la dezirata glor'
Volas vidi viajn ĉarmojn...

Mi amas tiom d' al vi,
ke ĝi estas tro tiom d'ami!

Ĉu ne estas ver' ke la sento
la plej nobla estas la amo?
Ĉu ne estas granda ĝoj'
senti kun la penskapablo
ĉiam en nia amatin'?

Mi nur scias ke pli bon'
estas vir' kiu sent' kaj amas
Mi scias ke estas benita
flam' kiu en mia sin' brulas
mi scias ke l' amo n' estas
peko, sed granda nobleco;
se l' amo estis inspirita
de boneco kaj beleco:
estas amo sanktigita.

Mi scias ke iu kantos
pli bele pri vi, iun tagon,
ĉar poeto eble li estos,
sed l' amo kiun li dirus
kiel mi, neniam sentus

Kaj...Adiaŭ, ke la tempo
nedaŭra, fugas rapide.

Estu feliĉ', amatino,
ĉar vi estis la unua
kiu enamiĝis...mian kor'!

& & &

Tradukis: María José Álvarez Faedo

Verkis: Gaspar Muñiz



"El Trasgu" (eble ekde la latina 'transgredi':) estas loka genio kiu genadas dumaniere: ŝanĝante la aĵojn de ilia kutima loko aŭ kaŭzante bruojn kiuj perturbas la dormadon aŭ timigas la homojn. La plejmulto de liaj agadoj okazas nokte, kiam la silento permesas percepti iun ajn bruon. Tamen liaj fiagoj ne estas tiel gravaj, kvankam la daŭrado de tiuj povas igi la vivadon neebla kaj trudi al la mastroj forlasi la hejmon. En iuj rakontoj, kiam, jam la lasaj pro elteni la Trasgu-on, la geloĝantoj ekiras, El Trasgu sekvas ilin sur la sama veturilo, iam portante objekton, kiu restis forgesita kaj kiun goje El Trasgu redonas.

El Trasgu vestas ofte ruĝe, kaj portas ĉapon.

Oni atigos lin elhejmigi finfine defiante lin fari unu el ĉi tiuj aĵoj:

- alporti korbon plena je marakvo
- preni el la planko ian kvanton da linsemo.
- blankigi felon da nigra kaprido.

En la Oriento de Asturio kaj parto de Kantabrio oni iam aŭdis pri 'trasginoj'.

Cezara Garcia

ZAMENHOFA FESTO EN AVILÉS

1995. Dimanĉo, 17-a Decembro

Ĉijare la avilesa grupo ANTAŬEN celebros la 136-an datrevenon de la naskiĝo de:

D-ro Ludoviko Zamenhof, aŭtoro de neŭtrala lingvo Esperanto.

La programo estas la jena:


11.30-a horo. Sankta Meso -en Esperanto- en la kapelo "Jesuo de Galiana".

12.30-a horo. Kultura agado, kiu okazos en la "Domo de Kulturo" laŭ la jenaj partoprenantoj:

- Maria José Alvarez Faedo, parolos pri la "Neceso de internacia lingvo tra la Historio".
- Nicolás Muñiz, babilos pri la 54-a Hispana Kongreso okazinta, pasintan monaton, en Salou (Taragono).
- Du lernantinoj de aktualaj kursoj interpretos simpatindan skecon titolita: **La Forgesema Klientino.**
- Santiago Mulas, Prezidanto de "Astura Esperanto-Asocio", el Gijón, disvolvos, laŭ lia vidpunkto, "Renaskiĝo de Esperanto en Aviles".

Maria Luisa Menéndez, prezentos la tutajn partoprenantojn.

14.30-a horo. Frata bankedo en Restoracio "La Estaca", strato Llano Ponte 25.



MESAGĜOJ

Laŭ la opinio de ĉiuj la ĉeestantoj al nia festotago pri la 136-an datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, ni sukcesis. Vere, ĉiuj la partoprenantoj disvolvis siajn intervenojn kun la plej bona intereso.

Aliaj memboj de ANTAŬEN partoprenis en la 54-a Hispana Kongreso, okazinta en la mediteranea urbo el Salou (Taragono) en la pasinta monato novembro. Nia prezidanto parolis pri ĝi en sia interveno. Kun emocio li laŭdis la mirindan prelegon de samideano Miguel Fernández Martín. Eĉ li permesis - per kasedo - ke, la ĉeestantoj, auskultus la belan kanton "media granaina", kiun Miguel interpretis kun sia belega stilo.

Ankaŭla prezidanto laŭdis la prezentadon de du interesaj libroj: "Lirikaj perloj de Al-Andalus" de la aŭtoro Marco Botella, kaj "Esperanto", -kurzo de internacia lingvo, kune kun la solvo de ekzercoj- tiel praktika kiel utila por komencantoj, originala de Miguel Gutiérrez Adúriz

Nia franca korespondantino, Ginette Gabillon, sendis al ni la programon de "Kvinpetalo" La estraro pensas disvolvi ĝin dum la nuna jaro 1996. Ni gratulas al ĉiuj, precipe al nia leteramikino, kiu intervenos parolante, je la venonta monato majo, pri Piedmigrantoj

Niaj Geamikoj:

TELESITA

Telesita estis demenculino, kiu vivis meze de la pasinta jarcento. Ŝia nomo estis Telesfora Castillo, sed populare ŝi estis konata kiel Tele, Telesa aŭ simple Telesita. Kutime ŝi vagadis tra la arbaro kaj ja tre plaĉis al ŝi danci kaj drinki.

La vivo de Telesita estis envolvita en vualo de legendoj, ĉiuj el kiuj, tamen, koincidas en tio, ke ŝi tragike mortis bruligita. Kelkaj diras, ke ŝi iam ebriiĝis, falis sur fajrejon kaj tie mortis; aliaj versioj diras, ke ŝi vagadis ĉie almozpetante kaj, ke ŝia morto okazis pro tio, ke iam dormante en vintro apud fajro, fajrero kaptis la vestaĵojn de la malfeliĉulino. Laŭ alia versio, plej disvastigata, Telesita iradis tra la kamparo de provinco Santiago del Estero kaj kutimis alproksimiĝi al alies domoj nur por ŝteli mangaĵojn kaj kiam ŝi aŭdis sonojn de muzikiloj anoncantaj la komenciĝon de iu balo. Iam ŝi kaŝe eniris la kuirejon de iu domo kaj pro troa apudeco al fajrejo, ŝiaj ĉifonaĵoj ardis. Rimarkinte tion, ŝi ektimis kaj fuĝis al arbaro, kie sekventage oni trovis ŝin bruligita.

Post la morto de Telesita ŝi estis konsiderata kiel popola sanktulino kaj tiu kredo ankoraŭ hodiaŭ postvivadas. Oni diras, ke ŝi kapablas fari miraklojn kaj ke ŝi plenumas ĉies petojn. Kiel danko al Telesita

pro la realiĝo de la favoro, la ricevinto devos nepre oferi okazigon de balo omaĝe al ŝi.

Por efektiviĝi la dankoferon, ĉe la enirejo de la kampara domo oni metas blankan littukon kaj antaŭ ĝin, meze, tablon, kiun oni ornamas laŭ la kutimo por la tiel nomata "velorio del angelito", t.e. la ceremonio por la ĵus mortintaj beboj. Laŭ tiea tradicio, se bebo mortas, ĝi estas konsiderata kiel anĝelo kaj en la anataŭentombigo estas realigata grandioza festo pro tio, ke en la Paradizon fine eniris plia senpekulo. La infana kadavro estas porokaze blanke vestita kaj ĉe la ŝultroj oni aldonas artefaritajn blankajn flugilojn ornamente la tutan ĉerkon per diversaj blankaj floroj.

Kiam noktiĝas la oferanto de la balo ekbruligas kandelojn kaj tiam ŝi li serĉas partneron. La kutimo estas danci sinsekve sepfoje la tradician dancon konata kiel "chacarera". Meze de la danco, la paro haltas plurfoje por drinkado. Se hazarde, iom da alkoholaĵo restus je la fino, nur la muzikistoj rajtas la ceteron findrinki. Post la dancado de la oferanto komenciĝas la balo por ĉiuj: najbaroj, parencoj kaj konatoj, kaj tiu festado daŭras ĝis la tagiĝo.

Tradukis. - *Atilio Orellana Rojas.*

Argentina kunlaboranto.

Kuriozaĵoj

Kunlaboranto : Liven Dek

* Luizo la dekkvara de Francio, la reĝo Suno, naskiĝis kun du dentoj.

* Pli ol 70 elcento de la homaro estis poligamia ĝis la alveno de kristanismo.

* Ĝis nun la Virgulino Maria estas la virino plej ofte aperanta sur la kovrilo de "*Time*".

* En kelkaj antikvaj kulturoj, oni kutimis enterigi homojn vivajn en la bazamento de la konstruaĵoj por protekti tiujn kontraŭ eblaj misfortunoj. Oni rakontas, ke kiam oni starigis la urbon *Tavoy*, sude de Birmano, oni lokis krimulon en la truo de ĉiu fosto por teni for la malbonajn spiritojn. Ĉi riton uzis ankaŭ la druido.

* La marihuano estis ordinare uzata en la societaj kunvenoj de la antikva Romo.

* La virino estas la sola mamulo, kiu sentas doloron ĉe la akuŝo.

* Ĉiutage mortas en nia cerbo pli ol 100.000 neŭronojn, kiuj ne estas anstataŭitaj. Pro alkohola ebrio perdiĝas pluraj milionoj.

LA VIROJ DE LA LAKTA VOJO

Mito de la insulo Melville (pr. melvi) rakontas kiel, pratempe, anoj de la popolo Maludaianini (pr. máludáianini) ofte ŝtelpaŝis en la arbaron kun la edzinoj de aliaj viroj, eĉ kvankam ili posedis siajn proprajn edzinojn. Tiu konduto kaŭzis multe da jaluzo kaj kvereloj kaj, iom post iom, tio kreskis en batalon, en kiu kelkaj viroj estis mortigitaj. Post tio, la Maludaianini iris sur la ĉielon, kie la viroj fariĝis la Lakta Vojo kaj la virinoj kelkaj apudaj steloj.

Nun kiam la Sunvirino, Wuriupranala (ŭúriúpranala), malaperas malantaŭ la okcidenta horizonto kaj la lumo de ŝia torĉo paliĝas, la viroj de la Lakta Vojo vojaĝas arege trans la ĉielon, vizitante la edzinojn survoje.

Fruvespere la Maludaianini frotas la sekan ŝviton for de siaj korpoj. Tio, falante sur la palpebrojn de la aborigenoj, tiom dormemigas ilin, ke, postnelonge, ĉiuj dormas sub la simplaj ŝirmiloj el arboŝelo.

La sekvantan matenon, kiam la steloj kaj la Lakta Vojo ekpaliĝas kaj la unua lumo de la Sunvirino aperas sur la orienta ĉielo, la mallaŭte melodia voko de la mielmanĝanta birdo, Tukimbini, vekas la aborigenojn el ilia dormo, pretajn por la devoj de alia tago.

Tradukita de *Winsome Greenhalgh* Brisbano.

Kunlaborantino: Patricia Harkin - Australio

GUTO (Eli Tominska)

La varma somera pluvo ĉesis. La suno, kiel heliantplanto denove brilis en la ĉielo kaj forpelis la lastajn nubojn.

Ani petis permeson de la patrino iri eksteren por ludi, tien, apud la blankaj lekantetoj, kun pezaj, pro la pluvo, kapoj. Ili kliniĝis al la tero kiel hontigitaj infanoj kaj la verda herbo estis aspergita per sennombraj diafanaj akvogutoj.

Enirigardante ilin, Ani pensis, ke ili estis kiel vitroperloj, el kiuj ŝi povas enfandenigi la plej belan kolieron. Subite, inter ili ŝi vidis buntan koksinelon, haltinta antaŭ unu akvoguteto.

Ĝi turniĝis gracie je unu flanko, poste al la alia. La Koksinele sin rigardis! Tio estas ĝia speguleto.” -Diris al si Ani kaj daŭrigis observi ĝin.

Neatendite la Koksinele leviĝis tute delikate, tusetis la guton kaj ĝis kiam la infano komprenu kio okazis, la akvospegulo malaperis. “Sed kiel tio eblas?” - miris Ani kaj kuris hejmen.

-Panjo- ekkriis ŝi je la

pordo.

-Kio okazis?

-Panjo, la Koksinele
sian speguleton!



englutis

-Kia speguleto? -

alrigardis

ŝin ne kompreninte ŝia patrino.

-La guto, en kio ĝi sin rigardis.

Certe ĝi estis soifa. Ĝi trovos novan guton por alia spegulo.

Kaj mi pensis, ke ĝi volas eltrinki ĉiujn speguletojn - diris Ani kaj jam trankviligita direktis sin al la pordo

El la bulgara tradukis: LILIJA KOLEVA.



Amuĝaĵoj

CISIMO



En restoracio klientulo krias:

- Kelnero, kelnero, en mia suptelero estas muŝo
- Vi pravas sinjoro, sed je tiel malmultekosta manĝaĵo, (ĉu vi esperas perdrikon?)

Du amikoj troviĝas, post tempo sen vidi unu la alian

- Kara amiko, kiel faras vi por esti tiel juna?
- La kialo estas ke mi neniam diskutas
- Ĝi ne estus pro tio
- Nu, ĝi ne estus pro tio

Instruistino demandas al lernanto

- Ĉu vi scias kiel nomiĝas la loĝantoj el Varsovio?
- Ĉiuj ne, instruistino

-ĈU KUIRAS AL VIA EDZO TAGMANĜON?

-MALOFTE. MI FARAS TIUTEMPE KIAM NI KVERELIĜIS KAJ VOLOS FARI AL LI MALAGREBLECON.

kunlaboranto *Kot zdzistaw*
POLONIO

- Bonan vesperon sinjoro, mi alvenas por agordi la piano

- Sed mi alvokis neniun
- Ne sinjorino, telefonis al mi viaj najbaroj

Mortiĝanta patro diras al siaj tri filoj

- Al vi, kiu estas la maljuna, mi donas la domojn de la alta loko el la urbo. Al vi, kiu estas la mezaĝa, mi donas la urbacentrojn konstruaĵojn; kaj al vi, kiu estas la plej junulo, mi donas la domojn kiuj estas apud la maro.

Tiam amiko komentas:

- Li estas riĉulo, mi antaŭe ne sciis
- Ne, li estas lakta distribuanto

Novedzo.- Ŝajnas al mi, ke io estas malĝusta ĉe la kuko, kiun vi faris.

Novedzino.- Ne povas esti! Evidente vi ne kapablas juĝi, ĉar la recepta libro diris, ke ĝi estas bonega!

kunlaborantino Patricia Harkin
AUSTRALIO

PETAĴO

Mi petas humorajojn el diversaj landoj por publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas). Sendu al:

CISIMO R. SIMON
c/ La magdalena nº 26 - 1º D
C.P.33400 - AVILES
ASTURIAS - ESPAÑA

Feliĉan novjaron al ĉiuj!

Estu sanaj dek du monatojn


Laŭ sezonoj diverse plaĉaj

Iru kviete kaj sen zorgoj

Ĉiu tago kiu alvenos

Alportu do al via vivo

Nenian nubon sed la sunon



Nova jaro atendas vin

Okaze de ĝia naskiĝo

Visko simbolas la feliĉon

Jam la ciferoj naŭdek ses

Aperas sur la kalendar'

Ritaj koregaj bondeziroj,

Ornamitaj per verda stelo

Nepre flugu al geamikoj!

Kunlaborantino : F. Terral - Francio

